Boulogne sur Mer
31, Boulevard Mariette

la 5$^{an}$ de Okt. 1923
19h30

Tre estimata Sinjoro,

Eble mia skribaĵo memorigas al vi kiu mi estas, ĉar vi certe forgesas tiun S$^{inon}$ kun kiu vi korespondis 1920 – 21 + kiun vi renkontis en Praha, kun kiu vi vivadis agrablajn Kongresajn tagojn, eble ĝi rememorigas al vi tiun belan lingvon – vi scias kiun? - tiun belan Esperanton – eble, eble - ???

Mi nur ŝercas + vi bone scias tion, ĉu ne?
Kiel mi bedaŭras ke viaj grandaj okupaĵoj malhelpas vin persisti en tio kion vi komencis.
Kiel mi bedaŭras ke mi nenion pli aŭdas pri via bela lando kiu tiel allogis min. Ĉiuj tiuj kiuj skribis antaŭe ĉesis. "Tout passe, tout casse, tout lasse". Ne estas tute vere ĉar ne ĉio pasiĝas, feliĉe .....

Mi bone ricevis viajn P.K. de la 3$^{a}$/7$^{a}$ + de la 13/VIII + bone dankas vin pri ili. La lasta estis de la bela Elbfall + samtempe mi estis ĉe la glaciaro des Bossous (M$^{t}$ Blanc) apud Chamonix. Mi sendis P.K. al vi la 4$^{an}$/VIII el Chamonix + ankaŭ leteron la 27$^{an}$ de Junio !!! respondante la vian kiu alvenis la saman tagon, matene. Ĉu vi ricevis ĝin?

Kiel vi ĉiuj fartas? Via filineto devas esti tre interesa nun kiam ŝi estas pli ol 2 jara. Ĉu vi ankoraŭ okupiĝas pri Esp.? Ĉu vi havas aliajn korespondantojn?

Mi okupiĝas ĉiam tiel vigle + korespondas fidele + preskaŭ ĉiuj daŭras same kun mi escepte ĉiuj el via lando.

Ŝajnas nun ke la XVI okazos en Sofia. Mi certe ne iros sed se ĝi okazos en Wieno mi certe ĉeestos.

Mi ricevis leterojn + P.K. de multaj ĉe la Nürnberga Kongreso. Ĝi ŝajnis sukceso sed certe se 5 000 personoj, estas bone por la propagando, ne estas bone por sin retrovi + interkonatiĝi. Mi tute ne bedaŭras ke mi ne ĉeestis ĉar ne estus estinta agrable por ni Francoj + ĉiuj (krom S$^{ino}$ Zamenhof) kiujn mi deziris vidi ne ĉeestis. Mi korespondas kun D$^{ro}$ en Varsovio kiu multe vojaĝas + havas multajn interesaĵojn rakonti + li ne ankoraŭ ĉeestis Kongreson + pro tro altaj impostoj li ne povis iri tiun-ĉi. D$^{ro}$ Leono Zamenhof ne ĉeestis + ripoziĝis en Druskieniki en Polujo.

La marbana sezono estas finita ĉe ni. Venis multaj personoj + la vetero estis belega. Okazis multaj festoj kiel ĉiujare sed tiun jaron, estis tre fama "Semaine du Poisson" 9an – 16 Septembro kun ekspozicio[1], tre bela. Ĉio por fiŝo + rilatante al la fiŝkaptado. 11 militŝipoj venis kies 4 fremdaj[2]. Okazis grandegaj baloj ŝipaj. Ĉio estis brila pro iluminaĵoj dum la tuta semajno. 100 000 personoj venis nur per la vagonaroj. La ekspozicio estis tre granda + bela. Oni propagandis pri tiu "semajno" en la tuta mondo.

Plie estas granda aŭtomobila kurso[3] de 36 kilometroj + dum 4 tagoj. La Kasino gajnis multe da mono tiun jaron.

Nun estas preskaŭ vintro. De post 3 aŭ 4 tagoj okazis teruraj ventegoj – ĉio krakis + oni kredis ke vere la domo faliĝus. Sed hodiaŭ ĉio estas trankvila + la suno brilas + la maro kvietiĝas.

Via Prezidanto Masaryk alvenas Parizon + ŝajnas tre simpatia. Ĉu estas vi kiu iam sendis P.K. al mi kun lia portreto? Tre bonkoran esprimon li havas.

Kiel ofte mi pensas al Praha – al Zofin, al Representa Domo – al la granda restoracio – al la balo – al la montetaj promenadoj sub varmega suno. Mi povus mense refari la tutan Kongreson de mia alveno ĝis mia

[1] En la originalo: ekzspocio.
[2] "... kies 4 fremdaj ..." Tiel estas skribite, francismo (donc), devus esti "... el kiuj 4 fremdaj ..."
[3] Ĉu "konkurso" ?

foriro. Ho! Estis belaj tagoj + oni estis pli juna je 2 jaroj !!!

Nun, mi forlasos vin sen iu ajn espero pri via respondo ĉar, antaŭ ĉio, mi volas ke vi faru nur ion laŭ via inklino + se tio ĝenas vin skribi, ne skribu. Tio ne malhelpos min en la estonteco saluti vin tut'kore + premi vian manon amike je memoro de belaj tagoj en Praha.

Sincerajn salutojn al vi + al via Edzino + al Eva mi sendas manĝaĵon por ŝia vespermanĝo, memoraĵo de nia "Semaine du Poisson".

Alice Sergeant

Ne kredu ke vi devas danki pri tio – la fiŝo estas tute senvalora. [4]

[4] Manskribita noto – papírová rybka